

## & Saluto el Varsovio:

< Rekante 21 el 29 batoj por strofo, entute 783 paŝoj dum 9 minutoj. Tri poemojn verkis Antoni Grabowski (1912). Baladigis Martin Strid per islandaj melodio kaj rekantaĵoj de Olav rajdistrozo, Norda kantaro #4417.>

### (#Melodio:

<1,5:29> (o;so /soososo doososo soolala so3so; mifa so mire do3;so soososo sooremi faamimi doomi;fa soso soofa milso; soso lalalaa sofa mire do dore; mire mimifaa soso lafa mi re do

)x27 )+

### (&Strofoj:

#### **,& Unua poemo. La pluva tago:**

'1 La /tago malvarma, malgaja, sensuna

(x:; **Se erar', li en star'** ;)

Ne haltas la ventoj kaj pluvo aŭtuna;

(x:; **Kaj ruĝa brulis fla2m'. ; Milde ŝarĝon li metis sub la montkruto ; milde ŝarĝon li metis sub la monta krut'.)**

'2 Vinujo je l' muro putranta sin tenas, ..... Sed ĉiu ekblovo foliojn deprenas, .....

'3 Mia viva malvarma, malgaja, sensuna: .....  
Ne haltas la ventoj kaj pluvo aŭtuna; .....

'4 Miaj pensoj sin tenas je tempoj pasintaj, .....  
Sed falas en vento esperoj velkintaj, .....

'5 Ekhaltu, ho, koro malgaja, ne plendu! .....  
Post nuboj la suno radias – atendu! .....

'6 Ne sola vi tiel kun sorto batalas, ..... En la vivon de ĉiu la pluvo ja falas, .....

#### **,& Dua poemo. La Reveno de l' Filo:**

'7 Post foresto multejara ; Venas filo mia kara; .....

'8 El migrado ĉiulanda ; Venas filo mia granda! .....

'9 En kabano mankis pano, ; Do elmigris li, infano: .....

'10 Nun revenas beljunulo ; Al hejmlando, al Vistulo! .....

'11 Kiel volus mi, patrino, ; Premi lin al mia sino; .....

'12 Doni volus mi festenon, ; Por saluti la revenon. ....

'13 Ve! ne mastras mi kabanon, ; Nek liberan havas manon; .....

'14 Mi, en mia propra domo, ; Estas kvazaŭ fremda homo. ....

'15 Ĉar al vi, fratin' pli aĝa, ; Post kamplimo hejmvilaĝa, .....

'16 Brilas, laŭ destino dia, ; Spel' alia, pli radia – .....

'17 Do akceptu lin, fratino, ; Per muziko kaj per vino! .....

'18 Li ne vidu ĉe l' festeno, ; Kiel premas min – ĉagreno. ....

#### **,& Tria poemo. Saluto el Varsovio:**

'19 Samideanoj, akceptu vi ; Korajn salutojn el Varsovi! .....

'20 Akceptu ilin, tra l' tuta mond' ; Disportu ĉien al nia rond'. ....

'21 Diru, ke ankaŭ sur pola ter' ; Batas koroj por sankt-esper', .....

'22 Ke ankaŭ tie, apud Vistul', ; Renkonte brilas amik-okul, .....

'23 Kaj etendiĝas fidela man' ; Sonas: "Bonvenu, samidean!" .....

'24 Kvankam la nokto ĉirkaŭas nin, ; Ni kredas: Tago brilos en fin'. ....

'25 Leviĝos fine la ora sun', ; Kie nur steloj flagretas nun. ....

'26 Ektondros laŭte triumfa kant' ; Pri fina venko de l' esperant'; .....

'27 Do mi nur preĝas: Ho, donu Di', ; Ke ĝin ekaŭdu ankoraŭ mi! .....